



3(176)  
2020

# Apudvistula Bulteno

de Krakova Societo ESPERANTO

**Bultenon redaktas:** ĉiuj anoj de Krakova Societo ESPERANTO,  
**Adreso por korespondi:** str. Sokolska 13, 31-515 KRAKÓW

Juliusz Słowacki

trad. Lidia Ligęza

## O Janku, co psom szyl buty

Było sobie niegdyś w szkole  
Piękne dziecię, zwał się Janek.  
Czuł zawczasu Bożą wolę,  
Ze starymi suszył dzbanek.  
Dobry z niego byłby wiarus,  
Bo w literach nie czuł smaku;  
Co dzień stary bakalarus  
Łamał wierzby na biedaku:  
I po setnej, setnej próbie  
Rzekł do matki, – „Oj, kobieto!  
Twego Janka w ciemność bito,  
Nic nie wbito – weź go sobie!...”  
Biedna matka wzięła Jana,  
Szła po radę do plebana.  
Przed plebanem w płacz na nowo;  
A księżulo słuchał skargi  
I poważnie nadał wargi,  
Po ojcowsku ruszał głową.  
Wysłuchawszy pacierz złęgo:  
„Patrz mi w oczy” – rzekł do żaka –  
„Nic dobrego! nic dobrego!”  
Potem hożą twarz pogładził,  
Dał opłatek i piętaka  
I do szewca oddać radził...

Jak poradził, tak matczysko  
I zrobiło... Szewc był blisko...  
Lecz Jankowi nie do smaku  
Przy szewieckiej ślipać igle,  
Diabeł mieszał żółc w biedaku,  
Śniły mu się dziwy, figle;  
Zwyciężyła wilcza cnota:

## Pri Joĉjo, kiu por hundoj kudris botojn

En lernejo estis iam  
Joĉjo, la infano bela,  
Sentis frue volon Dian,  
Egan guston al barelo.  
Estus li soldato-taŭro,  
Ĉar neglektis liter-konon;  
Ofte olda bakalaŭro  
Frakasis sur li bastonon:  
Kaj post centa, centa provo  
Diris al joĉja patrino:  
„Prenu lin, enbati povu  
Ion al li – vana. Fino.”  
Povra ino prenis filon,  
Iris al pastr’ por konsilo;  
Ploris antaŭ parokestro.  
Li aŭskultis vean plendon,  
L’ frunton sulkigis atente,  
Faris patran favor-geston;  
Aŭskultinte pri malbono  
Diris: „Rigardu senflata  
En l’ okulojn. Jen fripono”;  
Donis groŝojn kaj oblaton  
Kaj eldiris la konsilon:  
Al ŝuisto donu filon...

Laŭ konsilo la patrino  
Ĉion faris... sed la filo  
Ne prezentis fak-inklinon,  
Ne gustumis en kudrilo.  
Satan’ miksis lian galon,  
Joĉjo songis ĝuojn distajn;  
Venkis volo radikala,

Rzekł: „W świat pójde o piętaku!”  
A więc tak jak był – hołota –  
Przed terminem rzucił szewca  
I na strudze do Królewca  
Popłynął...  
Jak do wody wpadł i zginął...  
Matka w płacz, łamała dłonie;  
A ksiądz pleban na odpuście  
Przeciw dziatkom i rozpuście  
Grzmiał jak piorun na ambonie;  
W końcu dodał: – „Bogobojna  
Trzódka moja, bądź spokojna:  
Co ma wisieć, nie utonie”.

Mały Janek gdzie się chował  
Przez rok cały, zgadnąć trudno.  
Wsiadł na okręt i żeglował,  
I na jakąś wyspę ludną  
Przypłynawszy – wylądował...  
Owdzie król przechodził drogą;  
Jaś pokłonił się królowi  
I dworzanom, i ludowi;  
A kłaniając szastał nogą  
Tak układnie, że król stary  
Włożył na nos okulary.  
I wnet tymże samym torem,  
Dwór za królem, lud za dworem  
Powkładali szkła na oczy...  
Owóż król ten posiadał sławę,  
Jakoby miał wzrok proroczy;  
I choć stracił oko prawe  
Tak kunsztownie lewym władał,  
Że człowieka zaraz zbadał,  
Na co mierzy, na co zdalny:  
Czy zeń ma być rządca kraju,  
Czy podstoli, czy też szatny...  
Lecz tą razą wbrew zwyczajowi  
Król pan oczom nie dowierza;  
Czy żak Janek na tancerza?  
Czy na rządcę dobry kraju?  
Więc zapytał: „Mój kochanku,  
Jak masz imię?” „Janek”.  
„Janku, cóż ty umiesz?”  
„Psom szyć buty”  
„A czy dobrze?” „Oj, tatulu!  
Czyli raczej, panie królu!  
Jak szacuję, ręczyć mogę,  
Że but każdy ostro kuty  
I na jedną zrobię nogę,  
Czyli raczej na łap dwoje...  
To na zimę. – Z letnich czasów  
But o jednym szwie wystroję  
Na opłatku, bez obcasów;  
A robota takiej miary  
Że psy puszczaj na moczary,

Lernanto lasis ŝuiston;  
Diris: „Mi iros en mondon,  
Mizera, kun et-monero”  
Kaj sur la rivera ondo  
Li ekfluis kaj pereis.  
Prenis lin larĝa rivero...  
La patrino ploris, veis.  
Parokestro de ambono  
Kontraŭ idoj kaj diboĉo  
Vigle tondris kun aldono:  
„Kiun sort’ pendi disponos,  
Tiu tutcerte ne dronos.

Sorton joĉjan dum la jaro  
Divenus neniulo.  
Ŝipiris li tra la maro,  
Fine ekvidis insulon;  
Post albordiĝo renkontis  
Survoje reĝan kortegon;  
Eĉ momenton li ne hontis,  
Korpkliniĝis antaŭ reĝo,  
Faris tion tre gracie,  
Tiel bele, ke l’ reĝ’ glora  
Surnazigis emociu  
Splendajn okulvitrojn orajn.  
Kaj tuj ĉiuj korteganoj  
Kaj urbanoj kaj kampuloj  
Uzis vitrojn simultane.  
L’ reĝo famis pro okulo  
La maldekstra kaj profeta,  
(Dekstran li perdis iame),  
Kiu esploras sekreton  
De kapablo vira, dama,  
Kion homo bone farus,  
Kaj neniam ĝi erarus...  
Sed ĉi foje fuŝa testo,  
L’ reĝo ne fidis al Vido:  
Ĉu mimo estu ĉi ido,  
Dancisto, aŭ provinc-estro?;  
Do demandis: „Kara mia,  
Kia estas nomo via?”  
„Joĉjo”.

„Kion vi scipovas?”  
„Kudri botojn por hundaro.”  
„Kaj ĉu bone?” „Ho, mi faros  
Por ĉiu hunda piedo  
Boton el forĝita ledo  
Por vintro, kaj por somero  
Boton kun kunkudro unu,  
Leĝeran, sen kalkanumo,  
Kaj ĉiujn kiel el fero  
Bonkvalitajn. En ĉi boto  
Hundoj venkos ŝlimon, koton,  
Tra marĉejoj senhumide  
Kuros lerte kaj rapide.

Suchą nogą przejdą stawy.”  
„Masz więc służbę, złotem płacę” –  
Rzekł do Janka pan łaskawy  
I za sobą wiódł w pałace.  
A gdy dzień zaświtał czwarty,  
Szły na łowy w butach charty;  
A szewc chartów w aksamicie  
Przy królewskiej jechał świcie;  
Złoty order miał na szyi,  
W trzy dni został szambelanem,  
W sześć dni rządcą prowincji,  
W dni dwanaście został panem.  
Starą matkę wziął z chałupy,  
Król frejliną ją mianował.  
A plebana pożałował  
W biskupy...

„Do vi havas jam postenon  
Kaj mi pagos ĝin per oro”,  
Al Joĉjo diris l’Sinjoro:  
„Kun mi palacon alvenu”...  
Eĉ semajno ne forpasis:  
Hundoj bote iris ĉasi,  
Kaj suito en veluro  
Ĉe l’ reĝo rajdis plezure;  
Havis ordenon el oro,  
Post tri tagoj ĉambelano  
Fariĝis kaj kortegano,  
Post semajno – grandsinjoro.  
Estis ankaŭ laŭ favoro  
La patrino – korteg-damo,  
Episkopo – parokestro  
Dank’ al Joĉjo kaj Majesto.

Martha Walker (1905 – 1983)

## La hipio kaj la sinjorino

Nu, do! Mi vekigis. Malrapide ekvivas. Konscias pri certaj prepostuloj de la korpo. Eksaltu, virino. NUN!

Vira voĉo sonas en mian orelon (ĉar la radio-aparato preskaŭ neniam estas for de ĉi solloĝantino).

Voĉo:... „Kaj la eleganta sinjorino vidis malgrasan hipion etendanta la dikfingron pete. Tujtuj ŝi haltigis sian aŭtomobilon kaj invitis la hipion eniri.

- Ĉu vi volas hejmeniri kun mi?

(La hipio preskaŭ perdis la spirpovon.)

- Ĉu vi estas malsata? Ĉu vi ŝatus manĝi frambkukon kun kremo? Ĉu vi deziras tason da kafo?”

(Jesuo! pensis la hipio. Mi devas esti en la ĉielo! Eble mi songas!) Sed ne estas songo...

Baldaŭ ili atingis la hejmon de la bonkora sinjorino, kaj...”

B-r-r-r-r! La telefono sonadaĉis kaj interrompis la delikatan historieton de la radioanoncisto.

Mi rapidis por silentigi la damnindan aĵon.

„Marta! Divenu, kiu parolas! Hi-hi-hi! Kiu estas mi?”

Iu stulta frenezulino, devas esti. La vira voĉo daŭre sonadis en la alia ĉambro, bz-bz-bz. Sed mi pro decemo devis trakti kun la kretenino.

„Mi ne povas paroli kun vi ĝuste nun – pro-pro-nu, baldaŭ mi telefonos al vi. Tre baldaŭ!”

Mi ekĵetis la telefonon sur la ingon. Preskaŭ frakasis ĝin.

Vira voĉo, radiofonie: „...Kaj nun, vidu, la hipio estis en la litĉambro de la eleganta sinjorino. Ŝi alparolis lin ĝentile: - Nun, kara, vi demetu viajn vestaĵojn.”

Ĉu? Kio?!

Envere, la vestaĵo de la hipio konsistis nur el ĉifonaĵoj. Tre volante tiu komencis demeti ilin ĉiujn.

La sinjorino diris: „Mi baldaŭ revenos. Nur demetu ĉiujn vestaĵojn, bonvole!” Ŝi malaperis.

La povra hipio, la malgrasulo, nun staris nuda! Jes, nuda li staris en la bela sinjorina buduaro! Li atendis, mi devas rakonti al vi, iom malpacience la tujan revenon de la eleganta, bonkora sinjorino.

\* \* \*

La pordo de la ĉambro malfermiĝis, kaj la sinjorino eniris man-en-mane kun knabeto. Kaj nun ŝi diris severe al etulo: „Jen! Rigardu, kio okazos al vi se vi ne manĝos vian spinacon!”

La voĉo de la anoncisto normaligis: „Kaj nun mi deziras konsili vin, tuj iru al via najbara butiko por akiri specialan senpagan prov-flaskon de la fama ŜMIRAĴO MIR-AĴO, kio certe beligos vin pli bone ol spinaco...”

Hopla! Mia tago komeciĝis.

## Aŭtuno

Aŭtuno kiel longdaŭra malsano. Ĉiutage amputo.

Kaj subite kirurgo turnas la atenteman kaj severan vizaĝon: la suna espero plenigas arbaron, herbejon kaj gardenon.

Kaj fariĝas tiel nur pro tio, por ke malgranda, la plej malgranda, apenaŭ videbla araneeto povu plenumi sian taskon distirante en la aero grumelajn striojn de blankaj fadenoj.

Tamen erarus tiu, kiu deduktus de tio tro forajn konkludojn.

## Mia propra

Magra estas mia gardanĝelo. Li volas nek manĝi, nek trinki. Elfalas al mi el la mano kulero, kiam mi lin rigardas, mi verŝas sur la tablon la teon.

Li ankaŭ estas tre terure vestita. Ne eblas montri sin kun li en la societo, simple ne decas.

Grumblulo de li ankaŭ, kaj eble eĉ malklerulo. Li rigardas indifere mian bibliotekon, ne uzas banĉambron.

Foje li skribaĉas ion sur la vando aŭ rimas sence, aŭ saltas rompante al si ĉe ci tio la kapon je plafono kaj senhaŭtigante la genuojn.

Sed li estas la anĝelo, mia propra anĝelo, do mi ŝatas lin kaj ne volas la alian.

## Mi songĝis

Mi songĝis, ke vi venis kaj iris kun ni en palkolora ĉapelo kaj marinista ĉemizo.

Kaj mi songĝis, ke vi dormis kun mi, sed oni sciis nur tial, ke daŭris senĉese belvetero kaj ni iradis nudpiede tra sablo.

Kaj estas kun ni nia antaŭ nelonge mortinta amiko, kiu nenion parolis, sed oni sciis, ke estas kaj iras kun ni.

Ni iris tra vojbranĉo de la songo, kiel tra mara poldero, kiu montris la vojon, kvankam oni sciis, ke ĝi deŝiriĝos inter rokoj.

Trans fenestro enfalis norma cikado kaj rigardas min de litaj-deklivo per la protrudaj okuloj.

Ĝi estas groteska Andromeda desperanta sur la roko kaj samtempe liberiganta ŝin Perseo.

Transŝovita de la songa tranĉ-rando ĝi ne ĉesas brui kaj malesperi.

Ĝi tremas kaj ondoj de ĉi tiu tremo superverŝas la Cameronon.

Mi aŭdas ankoraŭ pluvon batantan je folioj de vinbero, kvazaŭ iu fremdulo irus laŭlonge de fenestro.

## Alvoko

Kuŝiĝu apud mi. Kiel vulpo ĉe vulpino, birdo apud birdo, kiam aŭdebliĝas ululo de strigo.

Ampleksu nin sago de la muto, saĝo de la varmo, saĝo de la adiaŭo longe antaŭ momento de la foiro.

Kuŝante reciproke apud ni ni rigardas en la nokton.

Korpkliniĝos antaŭ ni kvar montflankoj kaj vaguloj de la tenebro metos antaŭ ni elrevitajn donacojn, kuracilojn kaj talismanojn.